

NiaBulteno

OKTOBRO-DECEMBRO 2003 OUTUBRO-DEZEMBRO • Numero 82

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-r/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351+217 141 359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt



Franco Simões

pĝ.6

1924-2003

ALCINO ALVES

perdo sub verda standardo

NIA BILDO:

Paĝaro.pret

Jam www.esperanto.web.pt
novas; ne plu teste! pĝ.4,12

Ilon logan

Entute kandidatas deko da
logotipproponoj! Licas jam
influi la ĵurion. pĝ.7

STELDEKDUE...

Lobii radike

Portugalia en eŭropuniaj
lobiadoj por esperanto. pĝ.5

AKEL ekis

Jam eklernas esperanton
54 lernejoj en tri landoj.
Portugalo iniciatis. pĝ.5

KUNE VENI

Zfesto2003

Jam tradicias: la 14-an, jen
sidejen ni alvenos... pĝ.3

VFX: XIX-a

Kion post VFX? Ĉu emo
baldaŭ ripeti? Jen raportoj
priaj kaj proaj, sur pĝ.3-4

Novo curso básico intensivo para jovens: Lisboa, Dez'03 (p.5)

Nia Bulteno (informa bulteno de
Portugala Esperanto-Asocio)
Numero 82 (okt.-dec. 2003)

ISSN:0871-9241

Redaktoro:

António MARTINS-Tuválkin
Reviziis Werther SACRAMENTO
Eldonkvanto: 400 ekzempleroj
Komputile kompostita per
Adobe InDesign™ 1.6

Abono (4n-roj, nurekster PT):
8-ono de landa MA de UEA

Limdato por NB83: 2003.12.20
Finkompostita en: 2003.11.29

**Portugala
Esperanto-
Asocio**
**Associação
Portuguesa
de Esperanto**

(*pessoa colectiva de utilidade pública*)

✉ Rua Dr. João Couto 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA

☎ +351 217 141 359

☎ +351 217 933 924

✉ info@esperanto.web.pt/ aŭ

portugala@esperanto.web.pt/

☎ http://www.esperanto.web.pt/

Fondita en 1972.04.25

Landasocio de U.E.A. ekde 1979

K-ano A: Faria de BASTOS

Membroj: 123(+67) en 2003.11.26

Monata kotizo: 1,50€

(emeritoj kaj sub-18-jaruloj:

1,00€; malriĉuloj: 0,00€)

Aniĝkoto: 2,50€

GVIDORGANOJ: (ekde 2003.03.29)

Ĝeneral-Asemblea Stabo:

Prezidanto: José MARTINS

Sekretarioj:

Miguel OLIVEIRA

Werther SACRAMENTO

Estraro:

Prezidanto: Faria de BASTOS

VicPrezidanto: MARTINS-Tuválkin

Sekretario: Alcino ALVES

Kasisto: Silva ALMEIDA

Voĉdonantoj: Luís LADEIRA

Gonçalo NEVES

Alexandra G. e Paz

Kontrol-Komitato:

Prezidanto: Vítor MARQUES

Revizoroj: Francisco MELO

Manuel RUAS

NEELEKTITAJ POSTENOJ:

Instruado: (vakas)

Gazetaro: (vakas)

Libro-Servo: Silva ALMEIDA



Ne eblas trotaksi la gravon de nia ĵusa perdo. Nekrologon vi legos en posta paĝo, tie ĉi taŭge mi atentigos nur ke la homo kiun montras la kovrila foto aperis bildigita ĉibultene 11 fojojn, en absoluta rekordo: Ope aŭ sola, sed ĉiam aktivanta — 1^aFIC (kun Mário SOARES!), Zfesto'88, XIII R.P.E., 49-a HEK, Zfesto'89, *Expolíngua'90*, *Expolíngua'92*, Zfesto'93 (mime kiel Fernando PESSOA!), kun Ulrich LINS, Zfesto'97, Zfesto'02. Jen spuglo de ne trotaksebla gravo. Sed ne nur lia forpaso devigis la malfruon de tiu ĉi numero kaj prokrastigis plurajn temojn al la sekva numero, kulpas ankaŭ la netrankviliga stato de la asocia financo. Tamen zorgoj solvojn devigas. Pri tio ni okupiĝos eble en la venonta Zfesto, kaj certe en **NB83...** Ĝis tiam salutas via **red.**

Biblioteko: Werther SACRAMENTO

Pedrosa ALVES

(**periodaĵoj**) Wilson BRÍGIDO

(**eltdonaĵoj**) (vakas)

(**diversaĵoj**) (vakas)

Subencipetoj: Sandrina RODRIGUES

Fotarkivo: Olga ALMEIDA

Periodaĵoj: (vd. kolofonon)

Ret- kaj komput-aferoj:

Nuno MAGALHÃES

José MARTINS

MARTINS-Tuválkin

Luís MOURINHO

Lokaj Sekcioj:

PLUS — Portugala Unua Loka

Sekcio (nordokcidenta sekcio)

Repr.: Nuno MAGALHÃES

✉ Rua Paulo da Gama, 550-12ªA

PT-4150-589 PORTO

☎ +351 917 721 868

✉ <plusanoj@clix.pt>

Junulara Sekcio:

Portugala Esperanto-Junularo

Jovens Esperantistas de Portugal

(fond. 1993; TEJO-L.S. 1996)

✉ ☎ ✉ ĉe P.E.A.

Honoraj Membroj:

António da Silva ALMEIDA

Alsácia Fontes MACHADO†

Manuel de FREITAS†

Alberto Pedro da SILVA†

Adelino Franco SIMÕES†

Manuel de Sousa TEIXEIRA†

ALIAJ ORGANIZOJ:

Saluton! — Cooperativa Cultural dos Amigos do Esperanto e da Natureza

✉ Avenida Bissaia Barreto, 2

PT-3360-191 PENACOVA

✉ Rua do Miradouro, 12

PT-2735-300 CACÉM (SNT)

Nogeso — Norda Grupo de

Esperanto-Studado

(Oporto / Portugalinordo)

☉ dimanĉe 21:00; kafejo *Estrela d'Ouro*; str. *Fábrica*; Oporto

✉ ☎ ✉ ĉe PLUS

✉ <esperanto@mail.pt>

☎ http://www.nogeso.cjb.net/

Braga — Braga Grupo de

Esperanto-Studado

(Braga Distrikto)

✉ <esperanto_braga@mail.pt>

LANDAJ REPRESENTANTOJ:

U.E.A.: Silva ALMEIDA

ILEI: João José SANTOS

(setor_1@hotmail.com)

E.E.U.: Faria de BASTOS

TEJO: Ricardo TOSCANO

TEJA: Alan ROMERO

ILERA: Francisco MELO

(CT1CGE)

EJA: Faria de BASTOS

SAT: Pedrosa ALVES

IKEK: Alcino ALVES

IKUE: Salete dos SANTOS

XIX-a R.P.E.:

Post la deŜiro

La 19-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj trafe okazis, danke al la laboremo de kelkaj — aparte laŭdinda tiu de João Correia MARQUES, loka veterano. Forfalis unu programero (movada prelego), bonegis la restoracio, misis la paŝpromena parto, reeĥis la gazetaro kaj furoris la lanĉo de libro (vd. NB83). Je la disiro multaj tamen konfesis emon al io pli intensa kaj daŭra. Kion en 2004? (Ĝis tiam ĝuu la ĉiapudan raporton pri tre aventura partopreno.) **AMT**

ARANĜOJ:

Zamenhoffesto'03

Kiel fariĝis tradicie (vd. NB80:10-11, NB77:7, NB71:13 kaj NB70:3), lisbonaj esperantistoj invitas festi la naskiĝdatrevenon de Zamenhof per vespermanĝo en la sidejo; ĉijare dimanĉe la 14-an, ekde la 19:00. Ontoj sin anoncu telefone; endas antaŭpagi 5,00 €. **AMT**

SIDEJO:

Riparo duona...

Julie ĉijare ekis riparo en la sideja saloneto, sed ĝi baldaŭ haltis pro pluraj kaŭzoj kaj povis rekomenciĝi nur ĵus: Aŭguste inundego el najbara loĝejo igis partan malplenigon de la estrara oficejo kaj dume evidentiĝis ke pli ol saloneta murfarbado urĝas neceseja abriparo. Domanarasemblea burokratio kaŭzis plej multon de la prokrasto, sed bonŝance ankaŭ garantios partan elspezrepagon. Dume la sidejo plenas pake stake kiel karavanejo. **AMT**

XIX-a R.P.E.:

Veturpeti esperantien (1/3)

■ Nuno MAGALHÃES

Laŭplane matenis kiam mi kaj Xana Lrenkontiĝis en *Campo Alegre*. Ni kafumis (kia bela portugala kutimo) kaj diskutis nian vojaĝplanon: petveturi suden, festumi la datrevenon de António kaj ĉeesti la renkontiĝo en *Vila Franca de Xira* kaj reveni dimanĉe. Post, dorssakoj surmetitaj, ni ekeliris. La unua veturpetloko estis apuda, kie multaj aŭtoj preterpasas suden, trans la ponto *Arrábida*. Surprize, nur minutoj post ni ekmontris niajn dikfingrojn sinjoro haltis. «Saluton, kien vi iras?» «Suden, al Lisbono aŭ al ajna benzinejo». Post mallonga vojaĝo ni estis en nia dua veturpetloko: la benzinejo de *Gaia*, ĉe la superŝoseo, kaj tiam la vojaĝema sento ektrafis min. De tie reveni piede iom malfacilis, do nur unu vojo: suden!

Eble pro manko da dormado aŭ da deca matenmanĝado la du sekvaj horoj kvazaŭ nin frenezigis. Tuj nia timo pruvis sian verecon: Nuntempe, personoj kaj timas veturpeti kaj veturigi veturpetantojn. Malkovrante ke kamionistoj ne rajtas veturigi fremdulojn nin prenis alia sinjoro. La parolado abundis dum la unua duono de la vojaĝo al la benzinejo de *Mealhada*: pri ni, pri li kaj laboro kaj studo kaj la petveturado. Trovante nin senhejmulecaj la afablulo eĉ donacis al ni kafon kaj nia parolado daŭris kafumante (nu, trinkante kvazaŭan kafon). Tagmezis kaj li eĉ volis nin donaci tagmanĝon sed ni, dankegante, ne akceptis. ▶ *pĝ.4*

► La tria veturiganto, kiel la du antaŭaj, ankaŭ laboris pri io rilata al konstruado kaj ofte akceptis laborajn telefonvokojn. Tamen unu el la vokoj estis el lia filino kiu tute ne povis kompreni kial la patro ne jam estis hejme. "Kial" estis sendube ŝia plejŝatata vorto. Ankaŭ la ne tiom dezireblajn vokojn li akceptis (bone, la plimulto) kaj intere nia babilado fluis pri motorcikloj kaj naskiĝdatoj. Laŭ tiu sinjoro, multegaj infanoj naskiĝas je Majo; kaj lia klarigo: estas pro la somero! Ni ankaŭ ne perdis eblecon paroli pri esperanto, temo kiu pasive interesigis nian veturiganton. La vojaĝo estis erigita due ĉar ni haltis en benzinujo por benzinummi la aŭton. Tie mi miris antaŭ du paroj da motorciklistiristoj, eksterlandaj tutcerte, eble el Nederlando — jen unu el miaj revoj: tiel vojaĝi! Decidante pri kie lisbonie ni volus esti lacitytaj la veturiga afableco lasis nin en Bobadela. Pli bone, ni eliris la aŭton en la strato kie loĝas Irina, nia tiama gastiganto. Pli da bonŝanco en unua petveturado estus neebbla. Entute, per vojaĝoj kaj veturpetoj, ni alvenis post pli malpli 4 horoj kaj duono.

Pasportaj servoj

Post trovo de la pordnumero kaj etaĝo, nin ricevis Irina kaj ŝia bopatrino, kun kiuj ni restis dum la tago. Helpi purigi la telerojn, kuiri dolĉaĵojn, picon, prepari la tablon, ktp. La datrevenanto finfine alvenis, eskortita de sia filino Marta. La ceteraj gastoj (inkl. plia esperantisto, Alcino) alvenadis kaj la festo agrablis ĝis nokto. Asocianoj ne plu senesperu: Anĉjo nun havas novan poŝtelefonon! ► NB83

EKSTERA MOVADO:

Amaskonstruilojn

Apreris en la konata gazeto *Sennaciulo* (jun'03:86), organo de la maldekstrtendencara SAT, publika letero de la mozambika verkisto Mia Couto al la usona prezidento Geoge W. Bush. Tradukis el la portugala lingvo kaj enkondukis João J. SANTOS. AMT

ASOCIO:

Finfine publike!

Unu jaron post la unuaj testoj (vd. NB78:8), jen finfine publikiĝis en 2003.12.04 nova versio de la asocia retejo. Enestas la tuta antaŭa enhavo, plus multaj dume aldonitaj eroj, prezentitaj en tute nova aspekto, espereble alloga kaj utila. Vizitu en <http://www.esperanto.web.pt/> (vd. pĝ 12). AMT

ASOCIO:

1-a sekcio faktas

Laŭnounce (vd. NB81:3 kaj NB80:4-5) okazis en *Gafanha do Carmo* (mun. *Ílhavo*) fondkunveno de la Portugala Loka Unua Sekcio, akronime PLUS. Ĝi arigas ĉiujn 24 asociajn membrojn de 50 nordokcidentaj municipoj. La kunvenon ĉeestis unu estrara reprezentanto kaj plena deksesoj da sekcianoj, kaj novuloj kaj veteranoj, el kvin municipoj — inter kiuj la asocia asembleestro José MARTINS, kiu mem prezidis la kunvenon. La sekcia laboro formale ekos en 2004, per prezento al la estraro de laborplano kaj buĝeto. La kunvenejon disponigis estrarano A. Guerra e Paz, unu el la proponintaj sekcianoj. AMT

EKSTERA MOVADO:

INSTRUADO:

INSTRUADO:

Lobii radike Ekzamenite Reintensive

Post alvoko de la Radikala Partio, José MARTINS ĉeestis la fondkunvenon de "Komitato por eksperimentado de la Internacia Lingvo en Eŭropa Unio", brusele 2003.12.07-08. «Eĉ se mi ne tro radikalemas», li konfesis al *pea_diskut*; kaj promesis: «mi plu raportos poste». AMT

La portugalia Delegito de ILEI organizis julie (vd. NB81:3) ekzamenon de Esperanto I. Partoprenis 16 homoj (po 5 lernantoj de João J. SANTOS kaj de Cosme RESINA, kaj 6 retlernintoj) kelkaj je nivelo tre bona. Ĉiuj baldaŭ ricevos atestilon. (Vd. NB83) João José SANTOS

Komenciĝos en 2003.12.06 plia intensiva kurso por junuloj, ĉifoje en Lisbono (en la sidejo de P.E.A.). Gvidos A. MARTINS-Tuválkin dek ses lecionojn ĉiutage (18:30-20:30), per eksperimenta metodo. Registriĝis ok lernantoj, malgraŭ preskaŭ nenio anoncado. AMT

INSTRUADO:

AKEL: Eŭropo, Civitaneco, Esperanto

■ Luís LADEIRA (2003.11.15)

Ekis lastan septembron la antaŭe lanĉita projekto AKEL (Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj, vd. NB80:8). Kune kun la portugala mezlernejo de Pontinha (*Escola Secundária Braamcamp Freire*, kun 18 lernantoj) laboras ankaŭ la *Gimnazium n^o7*, en Koŝalino (*Koszalin*, nordokcidenta polia urbo; 29 lernantoj), la *Cuatro Caminos*, en Don Benito (hispana ekstremadura urbo; ok lernantoj), kaj la *Páfli Miklos K K*, en Gjoro (*Győr*, okcidenthungaria urbo; tie ne eblis ankoraŭ komenci pro privata kialo).

Ĉijare, kontraŭ niaj esperoj, la projekto ne estas subtenata de la Eŭropunia Programo *Socrates*, kvankam ĉiuj partoprenantaj lernejoj kandidatis al ĝi: La pola kaj hungara landaj agentoj rifuzis la respektivajn kandidatiĝojn, kaj tial malvalidiĝis la Eŭropunia subteno. Tamen la projekto daŭras!

Do, kion faris nun la lernantoj?

Kompreneble, ili lernas esperanton. En *Don Benito*, instruas José María SALGUERO; koŝaline, fraŭlino Magda SAWICKA, apogata de s-ro Czesław BARANOWSKI; kaj en *Pontinha* nuntempe la lernado okazas hejme per la komputila instruprogramejo de Carlos PEREIRA, kvankam unu fojon semajne ni kunsidas por interŝanĝi informojn kaj prezenti dubojn.

Ĝis decembro, plenuminte la unuan fazon de la projekto, informoj pri la lernantoj aperos en la AKEL-retejo (www.esperanto.web.pt/akel/). Poste ni klopodos ekinterkomuniki per tajpbabilejo. Por tio ni jam sukcesis subtenon de la portalo *Gxangalo.com*, kiu promesis malfermi apartan retĉambron kaj alligi ĝin al nia retejo.

Por provi novan kandidatiĝon al la Programo *Socrates* kaj por situacipunktumi la agadon, la instruistoj el la kvar (aŭ eble nur tri) lernejoj kunsidos venontjanuare en Lisbono. ■

NEKROLOGO:

Franco SIMÕES: perdo sub verda standardo

Pasis la homo, restas la verko. Tiu de Franco SIMÕES estas ne malpli ol la ekzisto mem de hodiaŭ funkcianta portugala esperanto-movado. Biografiaj notoj legeblas en NB76:6-7, publikigitaj ilustre de lia honormembrigo en 1999. Ekde tiam, eĉ post lia malsaniĝo, (NB72:4), lia agado, kvankam relative reduktiĝinta, tute ne ĉesis: Ja li estis ĝis la lasta tago envolvita en diversaj projektoj — ne nur la kutima libreldono sed ankaŭ klasifikado de la asocia fotarkivo, logotipkonkurso (kunaŭtoras unu el la apudpaĝaj proponoj) kaj movadhistoria registrado (NB83).

Lian subitan forpason, la lastan de aŭgusto, kaŭzis akcidento: stumblo surstrate sidejapude pro dumpaŝa lego (ĉu de esperantaĵo?); tio konsternas, ja li povus esti plu vivinta jarojn pli...

Ĉipaĝe kelkaj amikoj rememoras. En NB83 pliaj aperigos pri **si kaj li**; interesatoj b.v. kontaktu. **AMT**

Kian memoron pri Franco SIMÕES...

Antaŭ ĉirkaŭ deksep jaroj, mi aperis en Portugala Esperanto-Asocio kun volo fariĝi esperantisto. Tie mi ricevis la plej grandan lecionon far esperantisto, la leciono de la seninteresema servo al esperanto. Tiam, Franco SIMÕES, ankoraŭ plejenergia!, instruis, preparis teon, kiun li mem servis al la aliaj, prenis telefonvokojn, organizis, ktp. La eldonado de libroj kaj broŝuroj estis

unu el liaj plej amataj ĉevaletoj. Kiam li parolis pri esperanto, oni legis en liaj okuloj la entuziasmon pri la nova ideo, kaj liaj okuloj brilis infanplaĉe. Leciono por ni ĉiuj. Franco SIMÕES vojaĝis. Vojaĝis al mondo kie oni daŭre parolas esperanton... Ĝis baldaŭ, kara amiko. **João José SANTOS**

Donkiĥoto de Esperantio

Humile modesta, servema ĝis ekstremo, ĉiam preta klarigi, instrui, lecioni Esperanton, uzanta metodon rektan, foje motivanta malaprobos de pli junaj samideanoj, tamen estimata de ĉiuj pro lia ĉiama trankvilo kaj silenta preteco.

Werther SACRAMENTO

Verda vervo

Franco SIMÕES ĉiam pretis partopreni en turismaj kaj kulturaj ekskursoj organizitaj de mi, kadre de PEA-aranĝoj. Tiam, li ŝatis ĉiam kaj ĉien kunporti sian esperanto-flagon, sed facile kaj bonvole li akceptadis sugestojn ne uzi ĝin ĉiam, kiam novgeneraciuloj opiniis neoportuna flagflirtadon. Ege entuziasmiĝanta pri disvastigo de Esperanto, li kaptis ĉiujn ekaperantajn oportunojn por disdoni informojn pri la lingvo, kaj parkere recitis fragmentojn de poemoj, preĝoj kaj himnoj.

Alcino ALVES

Al nekonita teumisto

Saluton, kara inĝeniero F. Simões! Vi ne donis al mi sufiĉe da tempo por bone koni vin. Vi foriris unu jaron post mia eniro en la esperanto-movadon. Kial vi tiom rapide foriris? Kaj nun, la teon en sidejo?... Kaj la fluton en venontaj renkontiĝoj?... **Luís LADEIRA**

▼ Propono 6



▼ Propono 1



▼ Propono 8



▼ Propono 4



▼ Propono 9



▼ Propono 10



▼ Propono 2



▼ Propono 7



▼ Propono 5



▼ Propono 3



ASOCIO:

Dekalogon!

Post la alvoko en NB81:12, lavango da logotipproponoj trafis la redakcion. Necesis eĉ longigi la limdaton por ne bari tiom fertilan fluon. La dek ĝis nun ricevitajn proponojn

sendis ses membroj. Inter tiuj dek elektigis la onta logotipo de P.E.A. Decido aperos en NB83. Vidu la proponojn detalkolare en <http://www.esperanto.web.pt/logokonk.html>. Licas “influi” la elektontan ĵurion per preferesprimoj — sciigu vian al la redakcio! AMT

LINGVO:

Kiel traduki la vorton "casquinha"?

■ *Gonçalo NEVES*

Antaŭ nelonge mi dungiĝis ĉe la vortara fako de portugala eldonejo, kie mi nun plentempe laboras kiel leksikografo pri la portugala kaj hispana lingvoj. Kadre de tiu laboro trafis en miajn manojn la vorto *casquinha*, por kiu mi devis trovi traŝan hispanigon.

Mia maniero leksikografi estas simpla: mi ĉiudetale analizas la pritraktatan vorton, kaj trakukprovon mi faras nur tiam, kiam mi plene komprenas la tutan amplekson de ĝia signifo. Mi tute ne emas preni solvojn el antaŭaj vortaroj, ĉar bedaŭrinde mi konstatis, ke ne ĉiuj leksikografoj sekvas la saman metodon, kiel mi. Pluraj el ili senĝene paŭsas la tradukojn de antaŭaj kolegoj, kiuj siavice tion faris rilate la laboron de aliaj, kaj ĉi lastaj same agis koncerne antaŭirintojn. Eraro naskas eraron, kaj tia naskoĉeno pluiras senĉese ĝis la momento, kiam iu haltas kaj faras al si la demandon, ĉu ne estas tubero en la afero. Eble tial la simpla vorto *carapau* estas tiel mistraktata en pluraj vortaroj...

Jen do kion mi faris rilate la vorton *casquinha*. Mi havis svagan ideon, ke ĝi estas uzata en du apartaj fakoj — meblofarado kaj fabrikado de vazoj — sed mi vere ne komprenis, pri kio temas. Mi demandis pli aĝajn kaj spertajn familianojn — sen kontentigaj respondoj. Mi kontaktis prestiĝan dekoristinon — ŝi mem iam uzis *casquinha* dekore, sed klarigi ĝian konsiston ŝi ne kapablis. Ankaŭ pluraj meblofabrikistoj telefone ŝutis detalon

post detalo, sed klare kaj sendube respondi mian simplan demandon — kio do estas *casquinha*? — ili ne sukcesis. Tamen mi ne rezignis.

Fine prosperis al mi telefone babili kun meblofaka instruistino ĉe unu el la atelieroj de fondaĵo *Ricardo Espírito Santo*, kaj ŝi senhezite deklaris, ke la nomon *casquinha* rajtas ricevi nur mebloj plene faritaj el la ligno de arbara pino (*Pinus sylvestris*); ke iuj meblofabrikistoj tiun nomon disfoje misaplikas al mebloj el la ligno de aliaj pinospecoj, sed — se paroli teknike kaj rigore — nur la ligno de arbara pino estas vera *casquinha*.

Solvita la problemo meblofaka. Kaj kio pri la vazoj? Post pluraj provoj senfruktaj fine prosperis al mi telefone kontakti fakspertan fabrikiston de vazoj *casquinha*. Ankaŭ senhezite li erudis min, ke liafake la nomon *casquinha* ricevas vazoj el arĝentita kupro aŭ arĝentita latuno. Jen do: finfine mi povis komenci la serĉon de traŝa hispanigo por *casquinha*. Mi kaptis la okazon por verki slipon por esperantaj leksikografoj, ĉar tiu ĉi vorto mankas en ĉiuj ĝisnunaj vortaroj portugala-esperantaj. Jen mia propono:

casquinha 1 ligno de arbara pino (*Pinus sylvestris*) **2** arĝentita latuno/kupro, arĝente plakita latuno/kupro; **móvel de ~:** meblo el arbara pino; **taça de ~:** pokalo el arĝentita latuno/kupro

Esperanto estas riĉa lingvo. Kvan-kam mankas al ĝi laŭvorta ekvivalento

de *casquinha*, tamen ĝi disponas la vortojn *pinaĵo* kaj *plakaĵo* — ili estas pli ĝeneralaj, teknike ne tiel precizaj, sed tute taŭgaj en babiloj de nefakuloj. Por traduki *taça de casquinha*, oni povas simple diri *arĝentita pokalo*, kiam oni ne certas, ĉu la arĝenton oni plakis sur latunon aŭ kupron. En aliaj okazoj tute taŭgas eĉ la pli malpreciza vorto *plakaĵo*. Jen ekzemplo:

«*Tinham-nos prometido uma taça de prata, e afinal recebemos uma de casquinha!*»

Taŭga traduko, laŭ mi, estus:

«*Oni promesis al ni arĝentan pokalon, kaj tamen ni ricevis plakaĵon!*»

Mi esperas, ke la nuna artikolo iom helpos niajn leksikografojn taŭge pritrakti la vorton *casquinha*. Alia demando — por kiu mi ne trovis respondon — estas, ĉu ankaŭ brazilanoj uzas la vorton *casquinha*. Mi suspektas, ke ne. Kiu scias respondi? ■

Letero Amikoj

■ **A. S. Almeida (kompil.)**

Brazila komencanto, advokato, deziras korespondi pri diversaj aferoj kun portugalia esperantist(in)o, eĉ se komence en la portugala lingvo.

J. M. PASSOS

 jmpassos@bol.com.br


Nova litova esperantisto kolektas poŝtmarkojn, tre interesiĝas pri Portugalio kaj deziras korespondi kun 30-40-jaraj geportugaloj.

Jurgis VALIUNAS

 valiunasj@one.lt

Afganaj rifuĝintinoj partoprenantaj en esperanto-kursoj de la projekto “Lingvo de paco”, diligente eklerninte nun deziras koresponi tutmonde. Sendu kuraĝigan poŝtkarton eĉ se vi ne pretas korespondi. (Aldonu “IRÃO” en la adresfino.)


Yarbakht YAZDANI (22j)

 No:66, 8 Metri Abuzar 12 Metri Namju, Falake 2, Gol Shahr IR-91000 MASHAD

Zahra (18j) kaj Parvin (16j) AKBAR

 No:31, 12 Metri Namju, Gol Shahr IR-91100 MASHAD


Tahere AKBARI (23j)

 No:56, 8 Metri Dovvom Bad az 4 Rah, GOL SHAHR IR-91000 MASHAD

Hamide SALEHI (20j)

 No:63, Kuche Avval Daste Chap Milane Nanvai, 8 Metri Dovvom, Gol Shahr IR-91569 MASHAD

Nila (20j) kaj Fariba (15j) AKBARI

 No:8, K: Ali Darig Dakhel-e Meydan Vahdat 17, Rezaieye IR-91000 MASHAD

Zohre (16j) kaj Fatemeh (16j) kaj


Kobra (20j) EBRAHIMI

 No:53, 8 Metri Dovvom, Gol Shahr IR-91000 MASHAD


ZAHRA (17j) kaj Fateme (15j) Nabi Zade

 Darb-e sefid, K: Hasan Mardani, Bluk-e 7, K:Eshagi, 300 Dastgah Pich-e 2 Tal Gerd IR-91000 MASHAD

Nahid (19j) kaj Zahra (16j) HOSEYNI

 No:51, K:10, K: Hasan Goli Khani Baste Plain Haram IR-91000 MASHAD

Said BORHANI (kursestro)


 No:18, Shahrak Nur 2, Ab-o Bargh IR-91179 MASHAD ■



A. KASESA



(RR)



(RR)



MARTA LECLERCK

SIDEJO:

Jaron da gastoj

Rusino gerusojn gastigas: 3◀ En julio 2002 Nika kaj Denis petveturis el Moskvo Salamanken; veni al Lisbono estis eta paŝo pli. Ilin gastigis familio Martins-Tuválkin (Irina meze surfote).

Sen trudfotistoj: 4◀ La populara kantisto Jomo (Jean-Marc LECLERC) vizitis Portugalion kun edzino kaj filino en novembro 2002, laŭ invito de familio Martins-Tuvalkina. Temis pri ripoza restado, sen koncertoj; kaj ja oni tion respektis, eĉ je troa nivelo: Krom la gastigantoj, neniu alia esperantisto (malgraŭ sciigo per *pea_diskut*) entute aperis por kunesti kaj babili... Lin tamen vizitis portugalaj mikroboj: surfote Jomo malsanetas.

Fora najbaro: 1◀ Sergej MALCEV, rusa esperantisto loĝanta en Hispanio, vizitis sudan Portugalion danke al *Pasporta Servo* en januaro 2003. Surfote en la sideja saloneto.

Lisbone maratone: 2◀ Germana esperantisto Carol LEHR akompanis sian edzon Manfred al Lisbono, kie li partoprenis la EDP-maratonon, lastan marton. Kvankam li ne estas esperantisto, ŝi ja ankaŭ estas atleto, eĉ se je pli amatora nivelo: Dum li sabate ripozis hotelĉambre ŝi vizitis nian sidejon.

Mistrafita ŝanco I: Juna usona esperantisto Evan PRODROMOU intencis viziti nian sidejon dum sia dumonata restado en Lisbono (2003.03.15-05.15), sed al li tio finfine ne eblis.

Lokaj skuboj: Germano Werner FABER vizitis Madejron en aprilo 2003, kie li bedaŭris ne trovi aliajn esperan-

tistojn (kvankam tiujekzistas...). Hobbies plonĝisto kaj fotisto, li sendis kelkajn belegajn subakvajn fotojn, baldaŭ montrataj en la Asocia paĝaro.

Semajnfino suden: Tri tagojn juliaŭguste de 2003 vizitis Portugalion Sofiá BASOVA, juna rusa esperantistino, kiu tradukiste laboras en (rusiskale) apuda Ĝenevo. Celoj estis somerplaĝumi kaj viziti amikino Irina TUVALKINA, sian iaman esperanto-instruiston.

Mistrafita ŝanco II: Malnova portugalga esperantisto kaj P.E.A.-ano José MARQUES, delonge loĝanta en Argentino, vizitis Lisbonon aŭguste 2003. Bedaŭrinde pro misrenkonto ne sukcesis planata vizito al nia sidejo.

Survoje insularen: Pola familio Zemla (geparo kaj du infanoj, 5- kaj 9-jaraj) vizitis Acorojn lastaŭguste; ili mallonge restis en Lisbono pro aviadilinterŝanĝo, kie ilin gastigis familio Martins-Tuvalkina, danke al *Pasporta Servo*.

Tri jarojn ĉirkaŭ la mondo: Tiom longe vojaĝadas japana esperantisto Yoichi Kaneko! El Maroko Galegien li gastis nialande (danke al *Pasporta Servo*) aŭguste en Lisbono kaj Oporto.

Duaj lingvoj: Francesco REALE, juna itala esperantisto, vizitis Lisbonon septembre 2003. Kun li kaj loka amikaro renkontiĝis A. MARTINS-TUVALKIN: babilo okazis ital-, portugal- kaj esperant-lingve — ĉiujn Francesco plene regas!

Poŝtmarkoj vizite: Jam la trian fojon venas al Portugalio la esperanttema filatela kolekto de James Rezende PITON, konata brazila esperantisto. Kiel antaŭe (Lisbono 1992 kaj Oporto 1997), tio okazis en *Lubrapex2003*, septembre en *Centro Cultural de Belém*. AMT

Esperanto - Portugal - Microsoft Internet Explorer

File Edit View Favorites Tools Help

Address http://www.esperanto.web.pt/ Links >>

Paĝlisto

- Esperanto
 - Novaĵoj
 - Novaĵoj
 - Lingvo / Instruado
 - Dokumentoj
 - Komunikado
 - Movado
 - Historio
 - (aliaj)
 - Ligoj
 - Kliparto
 - Asocio
 - Lokaloj
 - Servoj
 - Libro-Servo
 - Mia Buteno
 - (aliaj)
 - (aliaj paĝoj)


Oficiala paĝaro de
Portugala Esperanto-Asocio
 www.esperanto.web.pt - portugala@esperanto.web.pt
 R. Dr. João Couto, 6 r/c A, PT-1500-239 LISBOA, Portugalio
 +351 -217 141 359

Nun: 2003.11.26 (merkredo) 01:28:12
 Stilo: Normala

Paĝo ĉe file:///E:/Niaj/Panorao/Ampea/Ampea/akceptejoj/ltbr/;
 modifita en 11.16.2003 23:51, far **AMT**.
Framojn fortou | remetu

Serĉo: Eki Temkadro: [Supro](#) | [Esperanto](#) | [Novaĵoj](#)

Asocio:
Franco Simões:
 1924 - 2003



Nia kara inĝeniero lasis nin la lastan de Aŭgusto. Ne eblas trotaksi la gravon de tiu ĉi perdo. Pluraj amikoj rememoras.

Asocio:
Pozitiva signo
 Finfine aperas la unua oficiala loka sekcio de Portugala Esperanto-Asocio! PLUS, aŭ **Portugalan Untan Lokan** **Sekcion**, proponis **Nogeso**. Marte ĝi aprobiĝis Asemblee kaj jule ĝi oficiale ekestis. Legu pli pri ĝi [tie ĉi](#).

Retumado:

Dää?
 ...esta paĝina em [português](#).

Krozi plu
 Nia paĝaro ankoraŭ ne plene pretas, sed eble vi deziras jam ion alian... Elektu do [vian vojon](#) el nia [listo de vizitindejoj](#).

Ĉu saŭdad'?
 Vizitu [tie ĉi](#) la malnovan version de tiu ĉi paĝaro.

(p0.4)

http://www.esperanto.web.pt/

REMETENTE:

Associação Portuguesa de Esperanto
Portugala Esperanto-Asocio
 Rua Dr. João Couto, 6-r/cA
 PT-1500-239 LISBOA
 PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio
annumero

últ. quota paga
lasta kotizpago

foto
foto

laste ricevita
interŝanĝnumero